Pete Seeger,

# Kelka floro, kie ĝi

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Kelka floro, kie ĝi
estas nur restinta?
Kie estas ĝi, ĉu vi
tion scias?
Kiu scias ĝin, ho Di'!
Inoj plukis tiujn ĉi.
Kiu komprenos ĝin?
Kiu komprenos ĝin?

Kelka ino, kie ŝi
Estas nur restinta?
Kie estas ŝi, ĉu vi
Tion scias?
Kiu scias ĝin, ho Di'!
Viroj prenis tiujn ĉi.
Kiu komprenos ĝin?
Kiu komprenos ĝin?

Kelka viro, kie li
estas nur restinta?
Kie estas li, ĉu vi
tion scias?
Kiu scias ĝin, ho Di'!
Soldatiĝis tiuj ĉi.
Kiu komprenos ĝin?
Kiu komprenos ĝin?

La soldatoj, kiujn mi
vidis militiri,
kie estas tiuj ĉi?
Ĉu vi scias?
Kiu scias ĝin, ho Di'!
Entombiĝis tiuj ĉi.
Kiu komprenos ĝin?
Kiu komprenos ĝin?

. . .

Pete Seeger,

# Ĉiuj floroj estas for

*tradukita de Wouter Pilger*

Ĉiuj floroj estas for,
Kie ili estas nun?
Ĉiuj floroj estas for,
Jam de longa temp'.
Ĉiuj floroj estas for,
Knabin' ilin premis al la kor'
Ĉu nun komprenas vi?
Ĉu nun komprenas vi?

Ĉiuj knabinoj estas for,
Kie ili estas nun?
Ĉiuj knabinoj estas for,
Jam de longa temp'.
Ĉiuj knabinoj estas for,
Edziniĝis post ador'
Ĉu nun komprenas vi?
Ĉu nun komprenas vi?

Ĉiuj edzoj estas for,
Kie ili estas nun?
Ĉiuj edzoj estas for,
Jam de longa temp'.
Ĉiuj edzoj estas for,
Soldatiĝis kun dolor'
Ĉu nun komprenas vi?
Ĉu nun komprenas vi?

Ĉiuj soldatoj estas for,
Kie ili estas nun?
Ĉiuj soldatoj estas for,
Jam de longa temp'.
Ĉiuj soldatoj estas for,
En la tomboj de l' memor'
Ĉu nun komprenas vi?
Ĉu nun komprenas vi?

. . .

Pete Seeger,

# Where have all the flowers gone?

Where have all the flowers gone?
Long time passing
Where have all the flowers gone?
Long time ago
Where have all the flowers gone?
Girls have picked them every one
When will they ever learn?
When will they ever learn?

Where have all the young girls gone?
Long time passing
Where have all the young girls gone?
Long time ago
Where have all the young girls gone?
Taken husbands every one
When will they ever learn?
When will they ever learn?

Where have all the young men gone?
Long time passing
Where have all the young men gone?
Long time ago
Where have all the young men gone?
Gone for soldiers every one
When will they ever learn?
When will they ever learn?

Where have all the soldiers gone?
Long time passing
Where have all the soldiers gone?
Long time ago
Where have all the soldiers gone?
Gone to graveyards every one
When will they ever learn?
When will they ever learn?

. . .

Kie la tombejoj ĉi
estas sur la tero?
Kie estas tiuj ĉi?
Ĉu vi scias?
Kiu scias ĝin, ho Di'!
Plorkovritas ĉiuj ĉi.
Kiu komprenos ĝin?
Kiu komprenos ĝin?

*Traduko de la Angla poemo "Where have all the flowers gone?" de Pete Seeger en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984-05-13.*

*MR-150-1 / Arg-722-1453 (2012-12-11 19:22:11)*

*Mi, Manfred Retzlaff, verkis tiun ĉi tradukon laŭ la germanigo de Max Colpet. Pri tiu rigardu la vikipediejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Max_Colpet`.

Ĉiuj tomboj estas for,
Kie ili estas nun?
Ĉiuj tomboj estas for,
Jam de longa temp'.
Ĉiuj tomboj estas for,
Kovras ilin flor-trezor'
Ĉu nun komprenas vi?
Ĉu nun komprenas vi?

Ĉiuj floroj estas for,
Kie ili estas nun?
Ĉiuj floroj estas for,
Jam de longa temp'.
Ĉiuj floroj estas for,
Knabin' ilin premis al la kor'
Ĉu nun komprenas vi?
Ĉu nun komprenas vi?

*Traduko de la Angla poemo "Where have all the flowers gone?" de Pete Seeger en Esperanton de* Wouter Pilger *(∗1942-01-26 – †2006-08-15).*

*Arg-722-1454 (2012-12-11 19:06:32)*

*Pri Wouter Pilger vidu la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Wouter_Pilger`. *La esperantigo de la kanto troviĝas en* `http://eo.wikipedia.org/wiki/%C4%88iuj_floroj_estas_for`. *Sondisko kun la kantata tekcto de tiu ĉi esperantigo estas aŭdebla en* `http://www.ipernity.com/doc/55897/3641585`.

Where have all the graveyards gone?
Long time passing
Where have all the graveyards gone?
Long time ago
Where have all the graveyards gone?
Covered with flowers every one
When will we ever learn?
When will we ever learn?

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas Pete Seeger.*

*Arg-722-1452 (2012-12-11 18:53:25)*

*Pri la verkinto vidu la retejojn:* `http://www.arlo.net/resources/lyrics/flowers-gone.shtml` *kaj* `http://de.wikipedia.org/wiki/Pete_Seeger`. *La teksto kantata de Marlene Dietrich estas aŭdebla en* `http://www.youtube.com/watch?v=f_ptqXqjsZw`.